

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO

MEKSIKO, marto 1983

Nº 3

Sed, kiu volas ŝanĝi?

En nia pasinta folio, mi parolis pri la krizo. Temis ĉefe pri la sekvoj de la krizo ĉe la esperantistoj. Sed, kial ni alfrontas krizon? Krizaj momentoj estiĝas kiam ĉe iu situacio aperas faktoro postulanta ŝanĝojn. Tiu faktoro, ĉe la meksika esperanto-movado, estas la urĝa bezono –pli kaj pli sentata– havi fortan organizaĵon. Ĝis nun, nia nura movado estis al poŝtoŝicejo por kontroli ĉu iu letero alvenis; aŭ senfrukta ĉetabla babilado; aŭ eterna disputado pro jam forgesitaj kialoj. Pli ol pri ‘movado’ ni devus paroli pri ‘stagnado’. La nomo de nia lingvo fariĝis ‘esperinto’.

Kiel ni festos la okdekjaran jubileon de esperanto en Meksikio? Kiaj nin renkontos la centjaran jubileon en 1987? Disigitaj? Elreviĝintaj? Ankoraŭ sopirantaj al pasintaj tempoj? Aŭ tutenergie kaj kunigite batalantaj? El tiu ĉi modesta parolejo, mi levas la plej sinceran inviton al organizado, al laborado, al kuniĝado.

“La afero vivos kaj konstante rememorigados pri si; post ĉiu nova silenta tempo, se ĝi eĉ daŭros dekon da jaroj, aperos nova revigliĝo; kiam laciĝos unuj batalantoj, aperos pli malpli frue novaj energiaj batalantoj, kaj tiel la afero iros tiel longe, ĝis fine ĝi atingos la celon.”

Freŝa akvo ĉiam troviĝas ĉe la fonto mem. Ni penu malŝtopi la fonton por ke la akvo fluu libere.

AŬDITE, VIDITE, LEGITE

Vi certe rimarkis nian silenton dum la pasinta monato. Pro personaj kaŭzoj, ni ne povis aperigi la informilon akurate. Do, la novaĵoj iom malnoviĝis kaj nun estas tute ekstertempa informi pri la elsendo kiun faris Radio Universidad antaŭ unu monato. Ĝi temis, fakte, pri ĝenerala prezentado de esperanto. Pli bone, ni informos kiam estos alia. Ĉar la respondeculo de la programo interesiĝis pri l'afero kaj ankaŭ pri eventuala kurso.

Ni ankaŭ informas pri longa artikolo verkita de D-ro González el Monterrey. Ĝi aperis en la kultura suplemento de 'El Porvenir', tiea ĵurnalo. Pere de personaj travivaĵoj, D-ro González informas eble pli efike, ol per seka teorumado. Verŝajne aliaj artikoloj sekvos. Ni gratulas la doktoron kaj dankas pro la alsendita ĵurnalo. Tia ekzemplo multobliĝu!

Dum la Internacia Libro-Foiro organizita de la Nacia Universitato, ni havis l'eblecon paroli kun la reprezentanto de Guozi Shudian, la ĉina eldonejo kiu, interalie, eldonas 'El Popola Ĉinio'. Niaj legantoj certe konas tiun ĉi belan kaj interesan revuon. La reprezentanto informis nin pri la eblecoj akiri multajn esperantajn eldonaĵojn, je tre favora prezo. Pri la revuo, ni devas aldoni ke ĝi estas sendata aerpoŝte, do ricevata tute regule. Kiu interesiĝas pri la libroj kaj la revuo, povas kontakti s-ron Enrique Lemus, en la telefono 651-2279. Li estas la peranto de 'El Popola Ĉinio' en Meksikio.

La tradukrondo pri kiu ni parolis en la pasintaj folioj, ekfunkcios tiun ĉi monaton. Ĉiuj interesiĝintoj, bonvolu peti informon al la redaktoro.

Ni ree esprimas niajn plej sincerajn dankojn al ĉiuj kontibuantoj, pro la informoj, opinioj, aŭ ĉiu alia materialo por tiu ĉi informilo. Bonvenitaj estos ĉe: Jorge Luis Gutiérrez. Pachuca 165-3, México 06140, D.F. 553-2322 kaj 543 1373.

Por esti konsekvencaj kun niaj priorganizaj postuloj, ni ekstarigos komitaton por labori tiudirekten. La unua paŝo estos, kompreneble, unuigi kiom eble plej multe da esperantistoj. Sed ne nur listigi ilin kaj sendi al ili la informilon. Kion la movado bezonas estas esperantistoj pretaj kunlabori. Ĉiuj povas helpi laŭ siaj kapablo kaj povoj. Provizore (t.e., se alia pli bona maniero ne estas decidita) la komitato konsistas el kvar fakoj:

Instruado –vakas; Financoj –vakas; Kulturaj Aferoj –Enrique Lemus;
Informado –Jorge Luis Gutiérrez

Se vi deziras partopreni iun el tiuj fakoj (aŭ alian kiun vi proponos),volu vin turnu al la redakcio.



Deziras korespondi: 40jara oficisto, ĉiuj temoj, kolektas poŝtmarkojn pri flaŭro kaj faŭno, reklam-kalendaretojn. Pavel Polnický, Příčná 150/VI., 290 01 Poděbrady, Ĉeĥoslovakio.

Gekomencantoj 10-15 jaraj volus korespondi kaj interŝanĝi diversajn objektojn. Skribu rekte al la supra adreso.

UEA-kotizoj: Atentu! Ekde la unua de aprilo 1983, la kotizo de UEA estos fikستا en guldenoj. Tio signifas ke ni devas pagi laŭ la valida kurzo en la dato de la pago. Nuntempe, unu guldeno egalas 56.65 pesojn, kaj la kotizo de UEA estas 39.00 gld. Do, ni devas pagi 2,209.35 pesojn. Tio signifas ankaŭ ke, por ni, estas pli oportune pagi plej frue, por eviti altiĝon kaŭzitan de eventuala devalutiĝo. Krom tio, aldoniĝas la 750 pesoj postulataj de la banko, kiel transpagaj kostoj. La MEF, kiel peranto de UEA en Meksikio, devos do, fiksi regularon tiurilate. Tio estos anoncata en la venonta numero.

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO